
# Kelkaj famaj uloj, kiuj naskiĝis en Anĵuo



Fontoj :

https://fr.wikipedia.org/wiki/Liste_de_personnalités_nées_en_Anjou
https://www.wiki-anjou.fr/index.php/Liste_des_personnalités_de_Maine-et-Loire
https://archives.angers.fr/aide-memoire/angers-en-personnes/angevins-celebres/
https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Carte_de_l'Anjou.svg


Espéranto-Angers
http://www.esperanto-angers.fr
info@esperanto-angers.fr



2024-05-03



**Adélaïde** [aŭ Blanche] **de Anĵuo** (~948-1026), filino de iu potenca grafo de Anĵuo.
Edzino de Ludoviko la 5a, reĝo de la Frankoj. Poste, edzino de la grafo Vilhelmo [Guillaume] de Provenco.



**Renato de Anĵuo** [René d'Anjou] (1409-1480).
Duko de Anĵuo, grafo de Provenco, duko de Bar, duko de Loreno, reĝo de Napolo, reĝo de Jerusalemo, reĝo de Aragono, poeto kaj verkisto.



**Jean de Pincé** (1480-1538).
Enketa juĝisto de la Seneskalo de Anĵuo. Urbestro de Angers inter 1511 kaj 1538.
Konstruigis la burĝdomon : *Logis Pincé*, nun muzeo.



**Jean de Lespine** (1505-1576), naskiĝis en Angers.
Estis franca arkitekto el Renesanco.
En Angers li konstruis : la *Logis Pincé*, la kampanilon de la katedralo.
Li ankaŭ ekkonstruis la kastelon de *Serrant*.



**Joachim du Bellay** (ĉ. 1522-1560), naskiĝis en Liré.
Unu el la plej grandaj poetoj - verkistoj de Renesanco.
Memoru lian *"Feliĉa, kiu faris, kiel Ulis', vojaĝon"* (poemo: *Bedaŭroj*).



**Jean Bodin** (1529-1596), naskiĝis en Angers.
Juristo kaj politika filozofo. Li influis la historion de la intelektularo de Eŭropo per la formulado de siaj ekonomiaj teorioj kaj per siaj principoj de *bona regadmaniero*.



**Théophraste Renaudot** (1586-1653), naskiĝis en Loudun.
Ĵurnalisto, kuracisto kaj filantropo. Li estis unu el la antaŭuloj de la skriba gazetaro. La 30-an de majo 1631, li lanĉis sian faman *Gazeton (La Gazette).*



**Gilles Ménage** (1613-1692), naskiĝis en Angers.
Gramatikisto, lingvisto, verkisto kaj ...pedanto. Ĉefaj verkoj : *Origines de la langue française (Originoj de la franca lingvo), Dictionnaire étymologique de la langue françoise (Etimologia vortaro de la franca lingvo).*



**Jean-Baptiste Moreau** (1656-1733), naskiĝis en Angers.
Ĉef-muzikisto de Ludoviko la 14-a.
Li verkis motetojn kaj teatrajn muzikojn.



**Jeanne Delanoue** (1666-1736), naskiĝis en Saumur.
Franca monaĥino, fondintino de la *Servistoj de la Malriĉuloj* kaj rekonita kiel sanktulino fare de la Romkatolika Eklezio.



**Pierre-Charles Trémolières** (1703-1739).
Anĵua pentristo de la 18a jarcento. Li estis komisiita parte dekoracii la burĝ-domon Soubise en Parizo.



**Joseph-Louis Proust** (1754-1826), naskiĝis en Angers.
Ĥemiisto, li anoncis sian leĝon pri la difinitaj proporcioj kaj interesiĝis pri la varmaeraj aerostatoj.



**Volney** (Constantin-François Chassebœuf de La Giraudais, comte [grafo], alnomata Volney) (1757-1820), naskiĝis en Craon.
Filozofo, orientalisto kaj politikisto. Dum 4 jaroj li vojaĝis en Egiptio kaj Sirio post longa preparado kaj publikigis sian raporton. Li ankaŭ vizitis Usonon. Li apogis Napoléon Bonaparte-n dum la puĉo de la 18-a de Brumero sed rompis kun li pri la konkordato.



**Louis-Marie Aubert du Petit-Thouars** (1758-1831), naskiĝis en la kastelo de Boumois, Saint-Martin-de-la-Place.
Botanikisto, li partoprenis en esplorvojaĝo en insuloj de Hinda Oceano (Madagaskaro, Maŭricio, Reunio) kaj revenis en Francion kun sekplantaro de 2 000 specimenoj. Li publikigis sian raporton.



**Charles Melchior Artus de Bonchamps** (1760-1793), naskiĝis en Juvardeil.
Li partoprenis en la vendea milito kiel rojalista generalo.



**Renée Bordereau** (1770-1822), naskiĝis en Soulaines-sur-Aubance.
Dum la Franca Revolucio, ŝi aliĝis al la trupoj de Vendée, alivestita kiel viro sub la nomo de Angevin, kie ŝi iĝis rajdanto de la katolika kaj Reĝa Armeo de Vendée. Partoprenante en la plej multaj bataloj, ŝi rapide iĝis rekonita kiel sentima kaj furioza militisto.



**Pierre-Augustin Béclard** (1785-1825), naskiĝis en Angers.
Ĥirurgiisto. Li sukcese aplikis anatomion al ĥirurgio kaj distingiĝis per la brileco de sia instruado.
En 1821 li publikigis eldonon de la *Ĝenerala Anatomio* de Marie François Xavier Bichat (1771-1802), kun notoj kaj aldonoj.



**Michel-Eugène Chevreul** (1786-1889), naskiĝis en Angers.
Ĥemiisto. Profesoro de Organika Ĥemio kaj direktoro de tinkturejo en Manufakturo Gobelins. Poste, direktoro de Nacia Muzeo de Natura Historio de Parizo. Li faris esplorojn pri grasaj korpoj de animala deveno kaj ellaboris teorion de sapfarado.




**Pierre-Jean David d'Angers** (1788-1856), naskiĝis en Angers.
Skulptisto. Li estis artisto kaj politikisto. Li skulptis la frontonon de la Panteono en Parizo, la statuon de la reĝo Renato en Angers, bustojn kaj medalionojn.



**Guillaume Bodinier** (1795-1872), naskiĝis en Angers.
Pentristo, disĉiplo de Guérin, li akompanis lin en la *Villa Medici* en Romo dum 25 jaroj.
Li pentris *La Demande en mariage [La geedziĝopropono].*



**André Leroy** (1819-1898), naskiĝis en Angers.
Hortikulturisto, li estis fama kaj grava Anĵua arbidejisto.
Li kreis la ĝardenojn de *Le Mail*, de la prefektejo kaj vortaron pri manĝeblaj fruktoj.



**Jules-Eugène Lenepveu** (1819-1898), naskiĝis en Angers.
Pentristo, li pentris la plafonon de la operejo Garnier antaŭ ol Chagall, la plafonojn de la teatrejo de Angers kaj de la kapelo de la Angers-hospitalo.



**Léo Delibes** (1836-1891), naskiĝis en Saint-Germain-du-Val / La Flèche.
Komponisto, li verkis multajn operojn, operetojn kaj baletojn kiel : *Coppélia* kaj *Lakmé.*




**Gaston Allard** (1838-1918), naskiĝis en Angers.
Botanikisto kaj parte entomologo. Li heredis la familian posedaĵon en la *Clos de la Maulévrie*. Poste li ricevis semojn kaj plantojn el la tuta mondo, kiujn li aldonis en la vegetaĵaron de sia posedaĵo. Iom antaŭ sia morto, li donacis sian arbovartejon al la *Instituto Pasteur* kiu poste transdonis ĝin al la Urbo de Angers.



**Edouard Cointreau** (1849-1923), naskiĝis en Angers.
Lerta industriisto, kreinto de la likvoro "triple sec" ; kvar generacioj sekvis sin ĝis hodiaŭ. Juĝisto ĉe la komerca tribunalo, municipa konsiliano, li dediĉis sin plejparte al sia urbo.



**Emile Giffard** (1842-1901), naskiĝis en Chaudron-en-Mauges.
Kreinto de multaj likvoroj. Tiam apotekisto de Angers, li elpensis la likvoron Menthe-Pastille. La familio plu produktas tiun likvoron per cento da kremoj fruktaj, likvoraj, ĉerizlikvoro ktp.




**Jules Bordier** (1846-1896) naskiĝis en Angers.
Pianisto, komponisto kaj orkestra direktisto. Li refondis la *Société des Concerts Populaires d'Angers*, kies rekta heredanto estas la Nacia Orkestro de "*Pays de la Loire*" .
Verkoj : *Nadia, La Fiancée de la Mer, Douze mélodies pour chant*.



**René Bazin** (1853-1932), naskiĝis en Angers.
Verkisto, ĵurnalisto kaj universitata profesoro. Inter aliaj li verkis la romanon "*La Terre qui meurt*" (*La Mortanta Lando*).



**Ludovic Ménard** (1855-1935), naskiĝis en Saumur.
Ardeza laboristo kaj sindikatisto, Li partoprenis la naskiĝon de ardeza sindikatismo. En 1904 li iĝis la unua sekretario de la Nacia Federacio de Ardezlaboristoj kaj en 1920 akirigis la statuson de ardezo-laboristoj, kiu asimilas ardezlaboristojn al ministoj por socialasekuro.



**Mathilde Alanic** (1864-1948), naskiĝis en Angers.
Verkistino, ŝi publikigis pli ol tridek romanojn, ĉiuj destinitaj al familia publiko: *Ma cousine Nicole, Le mariage de Hoche, Les roses refleurissent.* Ŝiaj romanoj ofte estas feliĉe inspiritaj de la anĝeva regiono. Ŝi ricevis la premion Sobrier-Arnould aljuĝitan de la Franca Akademio al moralismaj verkoj de bona literatura kvalito.



**Jeanne Rij-Rousseau** (Jeanne Caffier) (1870-1956), naskiĝis en Candé.
Ŝi starigis metodon inspiritan de Kubismo uzante triangulojn de paperoj. Ŝiaj koloroj estas helaj. Ŝi amikiĝis kun Paul Sérusier, Juan Gris, Georges Braque, Picasso ktp.



**Coco Chanel** (Gabrielle Chasnel) (1883-1971), naskiĝis en Saumur.
Modo-desegnisto, fasonistino kaj fondintino de la firmao Chanel. La influo de Chanel etendiĝis trans la vesto-fasonado. Ŝia estetika desegnomaniero estis aplikita en juvelarto, mansakoj, kaj parfumoj. Ŝia marka parfumo, *Chanel No. 5*, iĝis emblema produkto.



**Noël Roquevert** (1892-1973), naskiĝis en Doué-la-Fontaine.
Aktoro. Li ludis ĉefe dua-rolojn, tamen li aktoris en pli ol 150 teatraĵoj kaj pli ol 180 kinaĵoj, interalie: *L'Assassin habite au 21 (La murdisto loĝas ĉe la 21a), Un singe en hiver (Iu simio vintre), Les Diaboliques (La diabluloj)* ktp.



**Curnonski** [Maurice Edmond Sailland - Curnonski] (1872-1956), naskiĝis en Angers.
Gastronomo, verkisto, humuristo. Li estis elektita "Le Prince des Gastronomes" (Princo de Gastronomoj).




**Gaby Morlay** [Blanche-Pauline Fumoleau] (1893-1964), naskiĝis en Angers.
Teatra kaj kina aktorino. De 1914 ĝis 1964, ŝi aktoris en 109 kinaĵoj kaj en 37 teatraĵoj.
Estis unu el la unuaj virinaj, kiuj akiris la aerŝip-pilotlicencon.



**Jean-Adrien Mercier** (1899-1995), naskiĝis en Angers.
Filo de Geneviève Cointreau, pentristo, afiŝisto por reklamoj kiel "*Chocolats Meunier*" aŭ por kinaĵoj per 120 kinafiŝoj.



**Émile Joulain** (L'Gars Mile) (1900-1989), naskiĝis en Mazé.
Anĝeva rakontisto kaj poeto. Simpla eta ĝardenisto de la bordoj de la rivero Authion, kamparano en la koro, ligita al sia lando de Anĵuo kaj sia reĝa rivero, la "Loère" (= Loire en loka dialekto), dividita inter sia pasio por scenejoj kaj skribaĵoj kaj la postuloj de sia patra tero.



**René Rabault** (1910-1993), naskiĝis en Angers.
Teatrulo, ornamisto kaj verkisto. Li starigis la "*Festival d'Angers*" en 1950, kiu fariĝis "*Festival d'Anjou*" en 1975.
Li verkis multajn librojn "*Diction et expression*", "*L'ardoisier*" ktp.



**Julien Gracq** (Louis Poirier) (1910-2007), naskiĝis en Saint-Florent-le-Vieil.
Verkisto, li estas unu el la plej diskretaj verkistoj en la franca literatura pejzaĝo, juĝante ke verkisto devas malaperi malantaŭ sia verko. Li partoprenis la malmultenombran verkistaron kiu dumvive estis eldonita en la *Bibliothèque de la Pléiade*.



**Hervé Bazin** [Jean Pierre Marie Hervé-Bazin] (1911-1996), naskiĝis en Angers.
Verkisto famkonata pro siaj romanoj : *Vipère au poing (Vipuro en la Pugno), La Mort du petit cheval (La Morto de la Ĉevaleto), Qui j'ose aimer (Kiun mi aŭdacas ami)* ktp.



**Henri Dutilleux** (1916-2013), naskiĝis en Angers.
Komponisto kiu verkis ĉefe dum la dua duono de la 20-a jarcento. Lia muziko, kiu gajnis internacian laŭdon, sekvis la tradicion de Maurice Ravel, Claude Debussy kaj Albert Roussel, sed laŭ persona stilo.



**Joseph Wresinski** (1917-1988), naskiĝis en Angers.
Pastro, aktivulo kaj verkisto. Li fondis la Internacian Movadon ATD Kvara Mondo. Li ankaŭ lanĉis la internacian tagon por la abolicio de malriĉeco kiu okazas ĉiujare la 17-an de oktobro.



**Menie Grégoire** (Marie Laurentin) (1919-2014), naskiĝis en Cholet.
Ĵurnalistino kaj verkistino. Ĉefe konata pro sia radioprogramo titolita *Allô, Menie* de 1967 ĝis 1982.



**Noëlla Rouget** (1919-2020), naskiĝis en Saumur.
Ŝi aliĝis al la Rezistado en 1940, arestita en 1943 kaj deportita al Ravensbrück kie ŝi renkontis Geneviève de Gaulle. En Aprilo 1945, ŝi estis en la grupo de 300 virinoj liberigitaj kontraŭ internigitaj germanaj civiluloj.



**Yves Robert** (1920-2002), naskiĝis en Saumur.
Reĝisoro, scenaristo, produktoro, teatra kaj filma aktoro. Li aparte konatiĝis pro reĝisorado de la filmo "*La milito de butonoj*" (*La guerre des boutons*) en 1962.



**Daniel Gélin** (1921-2002), naskiĝis en Angers.
Aktoro kaj scenaristo. Li aktoris en multaj teatraĵoj kiel *Les parents terribles (La Teruraj Gepatroj)* kaj filmoj kiel *Paris brûle-t-il ? (Ĉu Parizo brulas? )* kaj surscenegis kelkajn teatraĵojn.



**Pierre Bouteiller** (1934-2017), naskiĝis en Angers.
Ĵurnalisto, radiogastiganto, filmkritikisto. Li estis nomumita programdirektoro de la radiostacio *France Inter.*



**Danièle Sallenave** (1940-), naskiĝis en Angers.
Verkistino, ŝi interesiĝas pri romanoj, eseoj, teatraĵoj kaj vojaĝrakontoj kaj estis elektita je la *Franca Akademio* (*Académie française*). Tre "respublikana", ŝi insistas, ke ŝi estas esence antiklerikala, maldekstrema, ateisma sed ne "malamika al religiaj aferoj".



**Patrice Chéreau** (1944-2013), naskiĝis en Lézigné.
Reĝisoro de teatro kaj operoj, reĝisoro kaj scenaristo de kino, kaj aktoro. Liaj verkoj kombinas plastikajn priserĉojn, politikajn pripensojn kaj esploron de homaj obsedoj.



**Fanny Ardant** (1949- ), naskiĝis en Saumur.
Kinaktorino, ŝi rolis en multaj filmoj kiel *Les Chiens (La Hundoj), Les Uns et les Autres (Iuj kaj ĉiuj), La femme d'à côté (La najbara virino)*. Ŝi gajnis dufoje la premion *César* por la plej bona aktorino.



**Etienne Davodeau** (1965-), naskiĝis en Botz-en-Mauges.
Bildstria aŭtoro, verkisto, scenaristo, ilustristo. Publikigis sian unuan albumon en 1992 : *L'Homme qui n'aimait pas les arbres (La Viro, kiu ne ŝatis la arbojn)*. Li gajnis plurajn premiojn.



**Nicolas Mahut** (1982-), naskiĝis en Angers.
Profesia tenisisto. Li iĝis monda numero 1 en duobla ludo, en 2016.

**Jean-Claude Brialy** ne aperas en ĉi tiu listo ĉar li ne naskiĝis en Anĵuo. Tamen, li povas esti konsiderata kiel "Anĝevano laŭ koro" por siaj agoj en la Anĵua Festivalo kaj siaj multaj amligoj kun nia provinco.

La limoj de historia Anĵuo etendiĝas preter tiuj de la nuna departemento *Maine-et-Loire.*

Vidu la apudan mapon.

